Semajno de la pola kulturo en Havano: Zamenof-Jaro

Okaze de la Unesko-rekono al Zamenhof, ĉi-semajne okazis en la nacia biblioteko de Kubo, solenaĵo pri la semajno de la pola kulturo, kaj tiucele, la pola ambasadejo en Havano, invitis nian asocion prezenti la vivon de dro.Zamenhof.

Kiel parto de la celebroj pro la semajno de la pola kulturo, okazis panelo pri elstaraj figuroj de Pollando, kaj nome de Kuba Esperanto-Asocio, la prezidantino Maritza Gutiérrez, prelegis pri la Zamenhof kaj lia heredaĵo al la homaro.

Dum la prezento oni ankaŭ emfazis la rekonon de Unesco laŭ propono de Pollando subtenate de Germanio kaj Slovakio, kaj tiel la agado de esperantisto kadre de tiu internacia organizo kaj same de UN kun kiuj UEA jam de multaj jaroj havas rilatojn.

En 2014 pro decido de Ministro de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, la lingvo Esperanto estis enskribita en Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

Aldone, la pola reprezentanto de la ambasado, sro. Adrian Chrobot, konfirmis la rekonon de la pola parlamento al la vivo kaj heredaĵo de Zamenhof.

La aranĝon partoprenis pli ol 50 personoj el diversaj organizoj kulturaj, ankaŭ de la hebrea komunumo en Kubo, diplomatoj kaj membroj de la asocio de UN en nia lando.

Dum la tuta jaro 2017, KEA organizos similajn eventojn, ekspoziciojn kaj prelegojn pri Zamenhof kaj la Unesco-rekono al lia vivo kaj agado en la provincoj Cienfuegos, Villa clara, Granma,

Santiago de Cuba kaj Guantánamo.